# Religio opio por la popolo?

Ĉu estas vere, ke Marks atakis la religion kiel „opio de l' popolo?"...... Ne estas vere! Almenaŭ ne kiel deziras kredigi miskomprenintoj k fuŝinformantoj. El ĉiuj mensogoj, kiujn cirkuligas malamikoj de l' marksismo, la misklarigoj pri la Marksa (1) rimarko rilate al „opio de l' popolo" eble estas la plej persista. Eĉ la SAT-kongresa raporto el Aarhus aldonas neklaran ĉapitron. (2)

Marks-atakantoj (ankaŭ multaj ŝajnmarksistoj) interpretas la rimarkon, kvazaŭ ĝi signifus ke la religio estas speco de fidrogo intence disdonata de la regantoj por tenadi en jugo la regatojn k ke pro tio la religio kiel tia devus esti atakata. El ili, kiuj tiel fuŝe k ofte kun malico prezentas la marksan karakterizon pri religio, nur malmultaj scias, kie en liaj verkoj estas trovebla la citaĵo. Eĉ pli malmultaj klopodis legi ĝin en la kunteksto. La fama frazo troviĝas en la enkonduko el unu el la relative nekonataj verkoj: „Kritiko pri la Hegela Filozofio de l' Leĝo". En ĝi Marks demonstras, ke estas malŝparo de energio k tempo, se oni provas korekti sociajn malbonojn per atakoj al la religio. „La mizero religia", li skribas, „estas esprimo de reala mizero k protesto kontraŭ la mizero materia. La religio estas ĝemo de l' subpremita estulo, la emocio de senkora mondo tiel multe, kiel la spirito de senspirita kondiĉaro. Ĝi estas la opio de l' popolo."

En sia fama KAPITALO Marks faris la rimarkon, ke „la religia mondo estas nenio alia ol la reflekto de la reala mondo." Tio signifas: Religio ne estas kaŭzo; gi estas efiko. Dum la homoj vivas en mondo, en kiu abundas mizero, en kiu la kaŭzo de tiu mizero ŝajnas nekomprenebla k atribuita al supernatura forto aŭ estaĵo, ili serĉados finan (liberigan) apogon en la imaga aŭ religia mondo. En tiu ĉi senco, k ne en alia, Marks uzis la vorton „opio", t.e. kiel kvietigilo por moderigi doloron, sed ne kiel fi-narkotiko aŭ malvirton-naska drogo. Tial estas nia tasko eltrovi la teran kaŭzon de la tera mizero k forigi tiun kaŭzon. Marks instruis, ke la kaŭzo de la nuna socia mizero troviĝas en la nuntempaj propraĵ-rilatoj, kiuj tenadas la plimulton (nome la senposeduloj) dependa de la malplimulto, kiu posedas ĉion, kio estas posedinda.

Kio furiozigas niajn ekspluatantojn tiel multe kontraŭ Marks, tio ne estas lia laŭdira „atako" al la religio. Ilia furiozo havas alian fundon, multe pli ĉi-mondan. Marks atakis la kapitalismon k institucion de la privatposedo. K li atakis per tia mortiga akurato laŭcela, ke, sesdek jarojn post sia morto, li estas mallaŭdegata k liaj vortoj estas torditaj. La misinterpretado de l' frazo pri „opio de la popolo" pruvas tion.

**Th. Veder.**

(1) Marks, ne Lenin, formulis la faman frazon.
(2) Vidu S-ulon (1947), no. 10, p. 2, tuta tria kol

**G. P. de Bruin: GVIDILO TRA LA ESPERANTO MOVADO kun nov-aperinta SUPLEMENTO (1936-1948 — ĉe SAT k FLE. — Prezo (kune): 0.42 dol.**

# Ni fondu Kooperan Fakon

Koopera movado post milito ludas gravan rolon en la mastrumado socia de multaj landoj. Sed bedaŭrinde iuj ne komprenas la socian signifon de kooperismo k volas ĝin forpuŝi al simpla butikismo k industriismo. Kooperismo tamen estas memstara socia movado, kiu kondukas nin al komunismo. Plej granda liberecana kooperisto Edvardo Abramo ski en siaj verkoj skizis la veran signifon de kooperismo. Inter ni SAT-anoj, multaj apartenas al iuspecaj kooperativoj, sed eble ne ĉiuj komprenas la grandan edukan rolon de l' koopera movado. Tial mi proponas fondi kooperan fakon ĉe SAT kun celo: 1) profundigi nian scion pri socialisma rolo de l' kooperismo; 2) utiligi esperanton ĉe kooperativanoj; 3) popularigi kooperismon ĉe esperantistoj.

Ĉiuj, kiuj interesiĝas pri kooperismo, estas petataj kontakti kun mi, cele organizi SAT-fakon. Kiam da ni estos kelkaj, ni elektos fak-sekretarion k prilaboros laborplanon.

**Stefan Rosloniec,** Piotrkowska 70-10, **Lodz,** Polio.

## AL LIBERPENSULOJ!

Antaŭmilite ĉiu socialisto fieris pro sia liberpenseco. Eĉ en SAT-organoj aperadis Liberpensula Paĝo. Venis milito. Ĉio ŝanĝiĝis. Tio, kio antaŭe karakterizis radikalecon, progresemon, estas forpuŝita. Kelkaj eĉ hontas, ke ili estas liberpensuloj. Por ne forpuŝi socianaron de socialisma konstruado, oni volas trudi opinion, ke religianoj povas esti bonaj socialistoj Nu, ni povas observi en Polio, ke post likvido de bienuloj k industriistoj, gvidas tutan subteran antipopolan agitadon la katolika pastraro, kiun ĝuste pro supraj kaŭzoj oni lasis ne nur libera, sed antaŭ ĉio oni ne konfiskis pastraran bienaron. Profitante el pli da libereco ol aliaj civitanoj, la pastraro kuniĝis kun faŝistaj bandoj kontraŭ sociŝanĝoj, kiuj okazis en Polio. En ĉiu juĝproceso kontraŭ murdistoj de laborist-kamparanaj aktivistoj, fadeno nin gvidas al preĝeja kripto. Esploru politikon de l' papo, kiu dancas laŭ takto de Marŝal. Ĉu aliaj t.n. sektoj k eklezioj gvidas pacan politikon? Ne! ĉiuj servas al usona imperiismo. Ĉu eblas dividi eklezianojn de ilia pastraro? Ne! Samtempe kiam ekleziano ne obeas pastron, li komencas perdi kredon al mirakloj. Do ĉu klasbatalanto povas esti kredemulo? Certe ne. Kredemulo povas esti nur socireformisto. Ni tamen vivas en jarcento de akraj sociŝanĝoj, kie ne estas loko por reformoj. Ni vivas en periodo de ekstremismo. Unuflanke plej dis volviĝinta kapitalismo kun ĉiuj siaj adeptoj eklezianaj, aŭ socialreformaj, duaflanke venkanta k batalanta popolo. Se iu volas trovi ian sintezon inter ambaŭ movadoj, li servas al kapitalismo k ĝia branĉo: eklezio. En statuto de SAT estas dirite, ke SAT estas klasbatala organizo de laboristaj esperantistoj. Ĉu eblus antaŭmilite diskuti pri akcepto aŭ neakcepto de religianoj? En nenies kapo ekiĝus tia penso. Ĉu tamen religianoj ne apartenis al SAT antaŭ la milito? Certe jes. Al neniu venus penso, ke oni malpermesu, eksigu ktp. Mi ne estas adepto de ĉikanoj. Sed ni devas forte teni en niaj manoj antaŭmilitan edukan rolon de l' SAT-movado. Permesante dum kongreso enlasi punkton pri religianoj, ni samtempe revizas nian ĝisnunan sintenon pri la klasbatala eduka rolo de SAT. Ĉu tiam eblos, ke en SAT-organoj aperu Liberpensula paĝo? Ne, ĉar ĝi jam rompus principon de neŭtraleco, kiun ni ŝuldas ankaŭ al religiemuloj. Tial ni liberpensuloj en SAT devas nin organizi k eldoni propran „paĝon". Oni ne povas silentigi veron k sciencon per mistifiko.

Ĉiu, kiun interesas la liberpensula movado, turnu sin al: **Stefan Rosloniec,** Piotrkowska 70-10, **Lodz,** Polio.

*(daŭrigo de paĝo 6)*

drao. Resûme rakonto de la ekzempla vivo de tiu granda norvega esploristo k bonfaranto de la homaro: oni scias pri la odiseado de la „Fram" al la norda poluso k pri la manĝoprovizado al la malsateganta Sovetio en 1920. Traduko ne ĉie tre korekta aŭ eĉ klara.

**II-a Serio, no. 1. La Portugala Literaturo,** de Agostinho da Silva, trad. M. de Freitas. — Kolekteto da mallongaj sciigoj, datoj, titoloj ktp pri la historio de la portugala literaturo: iom seka perspektivo, pro manko de citoj.

**II-a Serio, no. 2. Vivo de Pissarro,** originale verkis Ludovic Rodo. Bona k vigla rakonto pri la malfacila vivo de unu el la pionirtoj de la moderna pentrarto. Dek fotoreproduktoj de ties famaj pentraĵoj.

G. Varingien

# El Finlando

La vivstato de la laboristaro en la lando subite malboniĝis k ekzistas senlaboreco, kiun oni ne konis dum la pasintaj 15 jaroj. Ankoraŭ ĝi ne estas ĝenerala, sed ĝi ŝajnas rapide kreski. La esp-a vivo iom post iom vigliĝis kun promesaj perspektivoj, ĉar la plejmulto de l' studantoj konsistas el junularo. La tutfinlanda Fakfederacio (sind. movado), konsistanta el ĉ. 400 mil anoj, subskribis peton al UNO pri akcepto de esp-o por oficiala uzo k lernejoj. La finl. Lab. Esp. Kongreso decidis aranĝi propran grandan somerkurson en la okcidentborda havenurbo Turku, la 2.-10. julio 1949, k kore invitas eksterlandajn k-dojn partopreni, kiel instruistoj aŭ kursanoj.1) Magistro Setälä la 27. okt. informis per Radio la finnan loĝantaron pri la disvastiĝo de esp-o; li multe parolis pri la UEA-kongreso, sed bedaŭrinde ne eĉ per unu vorto menciis la kongreson de SAT. En la gimnazio de Somero (Finl.) okazas, kun aprobo de la ŝtata lerneja administracio, deviga instruo de esp-o 2-foje po du horoj semajne, en du klasoj; en la superaj klasoj la instruo estas libervola.

**A. Pihkanen**

**1) La kursopago estas 300 fmk (22 dol.) inkl. nutrado k logado (kun ekskursoj al historiaj lokoj, sporto ktp). Oni povas pagi per landa SAT-konto. Aligon anoncu al: k-ino Saimi Uuranen, Kulmkatu 10. A. 3, Helsinki.**